

N-ro 152-153 Vintro 2010

ISRAELA ESPERANTISTO

ISSN 1565-3315

Organo de Esperanto-Ligo en Israelo
האספרנטיסט הישראלי - ביטאון האגודה לאספרנטו בישראל

Hebrea Progreso en Palestino (J. Ŝemer)

Tri kongresoj en Kubo (A. Wandel)

Rava sperto en Israelo (Peter Kühnel)



IJK Netanja 1967



Israela Kongreso 2010



Redaktoro Amri Wandel *Vicedaktoro* Josef Ŝemer *Prezidanto* AmriWandel

Redakcia adreso
P.O.K. 22041,
IL-61220 Tel-Aviv
eli@esperanto.org.il
Retejo: ie.esperanto.org.il
Fondita 1959 kiel 'Nia Ligilo'.

Abontarifo por eksterlandanoj: 10 EUR.
Eblas transpigi al UEA-konto *elia-q*
aŭ mendi ĉe la Libroservo de UEA.

Anonctarifo: 1/4paĝo-20 EUR, 1/2paĝo-30 EUR

Kovrila foto IK2010: M.Otto



Karaj legantoj, en tiu-ĉi duobla n-ro vi trovos la trian parton en la serio pri la historio de ELI: pri la Internacia Junulara Kongreso okazinta en Netanja en 1967. Sekvos artikoloj pri pli lastatempaj kongresoj: la 11-a Israela Kongreso en Kacrin, la 6-a Azia Kongreso en Mongolio (de nia "ambasadorino" en Azio, Esti Saban), kaj la UEA-kaj TEJO-kongresoj en Kubo – "Israela" raporto" kaj intervjuo kun Shirley Amrani, nova JELI-anino. A bundas tradukitaj literaturaĵoj – sceno el la teatraĵo "La Usona Princino" el la plumo de Doron Modan; la fama "Kanto al Paco", okaze de la 15-jara datreveno de murdo de ĉefministro J. Rabin; kaj la rakonto "La Pereo de Sarnato". En la rubriko "persona renkontiĝo" gastas Martha Otto, kiu rakontas pri la Templanoj en Hajfo. Agrablan legadon, *Amri*

Enhavo

- 3 Rememoroj de veterano (III)*Josef Ŝemer*
- 5 Sceno el la teatraĵo "La Usona Princino" trad. *Doron Modan*
- 9 La Israela Kongreso en Kacrin.....*Amri Wandel*
- 11 Rava sperto en Israelo.....*Peter Kühnel*
- 13 Mia Esperanto-NASK-iĝo.....*Shirley Amrani*
- 15 Tri Kongresoj en Kubo*Amri Wandel*
- 18 Hebrea progreso en Palestino*Josef Ŝemer*
- 22 Kanto al Paco- memore al J.Rabin*Amri Wandel*
- 24 Azia Kongreso en Mongolio.....*Esti Saban*
- 25 E-o kiel pera lingvo por instrui la hebrean.....*Luiza Carol*
- 26 Persona Angulo: *Martha Otto*
- 29 La Pereo de Sarnato trad. *Adam Mesha (Raizen)*
- 36 Agado de ELI/ Gratuloj/Ni funebras: Ŝ. Mizeruĥa
- 39 REVI en fotoj*Amri Wandel*

Rememoroj de israela Esperanto-veterano

Josef Ŝemer

Tria parto: La junulara kongreso en Netanja, 1967

En la antaŭa numero de nia revuo mi rakontis pri la 52-UK (*Universala Kongreso de Esperanto*), kiu devis okazi en Tel-Avivo en julio 1967 sed estis nuligita preskaŭ lastmomente pro la Sestaga Milito (5-10 jun.). Sed kio pri la 23-a *IJK (Internacia Junulara Kongreso de Esperanto)*, kiu devis okazi tuj poste en Netanja?




Partoprenantoj de la IJK en Netanja. Videblas Ans kaj Hans Bakker, ilia filo Mark, Jinon Meiri, Aleksander Manor, Josef Murĵan, Moŝe kaj Liora Ben Porat, Moŝe Savir, kaj Ĥana Rot.

Do, UEA decidis translokigi ankaŭ ĝin al Roterdamo. Mi memorigas vin, ke la decido pri la nuligo de ambaŭ kongresoj estis akceptita POST la fino de la milito. Tial la decido rilate la IJK-on ne plaĉis al Moŝe Ben-Porat, 19-jara aktivulo el Netanja, kiu estis la ĉefa organizanto de tiu ĉi kongreso. Li rifuzis akcepti la decidon. Moŝe, kiu loĝis en Netanja kaj lernis Esperanton en 1966 ĉe Moŝe Savir kadre de posttagmeza rondo en lia mezlernejo, sukcesis – preskaŭ sola – ekde la

lastaj monatoj de 1966 ĝis junio 1967, organizi la IJK-on, kiu devis okazi en julio '67 en la feri-vilaĝo **Blua Golfo** norde de la urbo. Pli frue, en 1966, ELI decidis sendi lin al Hungarujo por partopreni la 22-an IJK-on, okazontan en la urbo Pécs, kaj ankaŭ la 51-an Budapeŝtan UK-on. En Pécs Moŝe disdonis al la kongresanoj faldfoliojn eldonitan de la urbestro de Netanja. Sur ĝia ĉefpaĝo aperas la jenaj vortoj: "La Urbo Netanja salutas la kongresanojn de la 22-a IJK de TEJO kaj kore invitas ilin al la 23-a IJK en Netanja. Ĝis la reveno – Vic-urbestro d-ro A. Bar Menahem." Poste sekvis priskribo de la vidindaĵoj de la gastiga urbo kaj... mencio pri ĝia bonega klimato. (ĉu en 1966 oni ankoraŭ ne ŝvitis en Netanja dumsomere?... Moŝe nun diras, ke oni ŝvitegis, sed neniu plendis...)

Nia juna delegito revenis el Hungarujo al Netanja tre fervora kaj komencis labori. Bonŝance lia patro estis tre alta oficisto en la regiona oficejo de la Ministerio pri Internaj Aferoj, kio helpis al li krei bonajn kontaktojn kun la urbestro kaj kun aliaj ŝtataj instancoj. Oni sukcesis akiri por la kongreso senpagan folklor-programon, organizitan ekskurson (dank` al **Keren-Kajemet**) ktp. Helpis al Moŝe en lia preparlaboro kelkaj pliaj finintoj de la E-kurso, sed verdire la plimulton de la laboro li faris mem. Lia ĉefa helpantino estis lia koramikino Liora, kiu fariĝis poste lia edzino.



Do, kiel mi jam skribis, en junio '67 Moŝe ne konsentis akcepti la nuligo-decidon. Li tuj skribis al UEA minacante, ke se ili ne okazigos la junularan kongreson en Netanja, li rifuzos redoni al ili la monon jam ricevitan de la aliĝintoj. "La milito jam finiĝis kaj la vivo en Israelo estas denove sekura kaj normala. La nuligo de la IJK estas neakceptebla", li skribis al ili. Sekve de tio UEA decidis, ke krom la ĉefa IJK, okazonta en Roterdamo, okazos – tuj post ĝi – kongreseto en Netanja, por tiuj, kiuj deziras iri tien. Do, okazu fakte du internaciaj junularaj kongresoj...

Kaj tiel vere estis: en Netanja kunvenis dum unu semajno (9-16/8/67) kelkaj dekoj da esperantistoj – junuloj kaj aliaj. Kelkaj el ili venis speciale el eksterlando, dezirante esprimi solidarecon kun Israelo. Ekzemple, la fama

esperantista familio Bakker venis el Nederlando por ĉi tie kongresi: patro (Hans), patrino (Ans) kaj du infanoj (Mark kaj Ĥaja. Eble dank` al tio Ĥaja vivas nun en Jerusalemo kun siaj edzo kaj 3 infanoj). Mi memoras ankaŭ partoprenantojn el Kanado, Svedujo kaj Pollando. Ankaŭ mi partoprenis la kongreseton, sen tranokto. Ni kunvenis en agrabla loko apud la marbordo kaj loĝis en tendoj. Okazis tuttaga ekskurso al Galileo, vizito al diamantfabriko en Netanja, promenado tra la urbo, vizito al *Ulpan Akiva* (lernejo de la hebrea lingvo), akcepto ĉe la Urbodomo, Nacia Vespero, prelegoj, komuna banado en la maro kaj – kompreneble – multe da amikeca babilado. Regis intima kaj tre bona etoso. Mi menciuj kelkajn prelegojn: prelego pri Israelo akompanata de lumbildoj (Moŝe Savir), prelego pri ekspedicioj al la polusoj (Kamil Perlman), oratora konkurso kaj simpozio pri oficialigo de Esperanto.

Oni ankaŭ inaŭguris straton Zamenhof en Netanja, en la meza parto de la urbo. Do, dank` al la insistado de Moŝe Ben-Porat okazis ankaŭ ĉi tie eta IJK.

Menciujdas, ke parto de la israelaj esperantistoj, kiuj aliĝis al la neokazinta Tel-Aviva UK, partoprenis la IJK-on en Netanja; kaj same kiel estis interkonsentite kun UEA, oni konsideris ilian pagon al la nuligita UK kiel pagon por la IJK.

19 jarojn poste – en aŭgusto 1986 – okazis en Israelo la 42-a IJK. Ĝi okazis – tute hazarde – sufiĉe proksime al Netanja: en la junulara vilaĝo *Neurim*. Sed tio estas jam alia rakonto.

"La Usona Princino"

Nissim Aloni (1963)

tradukis: Doron Modan

Fono: La reĝo Bonifacius Victor-Felix von Hohenschwaden, kaj lia filo, la kronprinco Ferdinand, fuĝis de sia hejmlando, granda Bogomanujo, al iu lando en Sud-Ameriko. Hodiaŭ la eksa reĝo nomas sin Felix van Schwank kaj apenaŭ vivtenas sin de lecionoj pri la franca. Lia filo, eksa princo, nomiĝas en la ekzilo Fredi.

La patro vizitas Marita, putino de "Strato de la luno", apud la trajno-stacio. Li ne scias, ke ankaŭ lia filo ĝuas ŝiajn favorojn.

Nokto. Foraj gitaraj sonoj. Sur la scenejo estas nebula lumo. Dekstre, strato-lanterno. Profunde, neona ŝildo 'Hotel Excelsior'.

La reĝo eniras de maldekstre, tenante bukedon de floroj. Deklamas ampoemon.

Ekrimarkas sian filon, Fredi.

La reĝo: Ĉu estas vi, Ferdinand?
(Hupo de lokomotivo. Fredi alproksimiĝas al sia patro, malrapide, la manoj en la poŝo)

Fredi: Estas mi. Kiel vi fartas?

La reĝo: Kion vi faras ĉi tie?

Fredi: (Elprenas cigaredon) Mi ĉirkaŭiras.

La reĝo: Ĉi tie? Tiom for de Avenida Bolivar?

Fredi: Mi havas aŭtomobilon.

La reĝo: Aŭtomobilon!... Vi estas rapida, ŝajnas al mi ke ankoraŭ ne pasis semajno ekde kiam vi lasis la hejmon.

Fredi: Semajno. Jes.

Proksimume.

La reĝo: Mi ne sciis ke vi
interesiĝas pri la ĉirkaŭaĵo
de la trajno-stacio.

Fredi: Jes... Jes... Kaj vi?

La reĝo: Mi?

Fredi: Kion vi faras ĉi tie?

La reĝo: Mi faras kion mi faras ĉi
tie.

Fredi: Deklamas.

La reĝo: Deklamas!

Fredi: Mi pensis ke vi deklamas

nur en la noktoj de mardo kaj sabato. Hodiaŭ estas lundo.

La reĝo: Lundo, prave. Kial tio tiom ekscitas vin?

Fredi: Tio entute ne ekscitas min. Simple mi rimarkis ke vi havas
fiksajn kutimojn. Nun mi rimarkas pri ŝanĝo.

La reĝo: Ĉu mi devas kompreni, ke vi kutimis kaŝe sekvi min?

Fredi: Vi mem rakontadis al mi.

La reĝo: Ke mi iras al la stacidomo.

Fredi: Por rigardi la trajnojn.

La reĝo: Por rigardi la trajnojn. Vi ne kontraŭas, mi esperas?

Fredi: Ne.

La reĝo: Do, mi iradas al la stacidomo. Ankaŭ lunde.

Fredi: Kun floroj?



La reĝo: Kio?
 Fredi: (*indikas pri lia mano*) Tio, kion vi tenas malantaŭ la dorso.
 La reĝo (*malkaŝas la florojn*) Kun floroj.
 Fredi: Vi iradas por rigardi la trajnojn kun floroj.
 La reĝo: (*obstina*) Mi iradas por rigardi la trajnojn kun floroj!
 Fredi: Mi – sen.
 (*hupo*)
 Fredi: Trajno.
 La reĝo: (*rigardas la horloĝon*) Jes, elveturas.
 Fredi: Tiu ĉi trajno-stacio neniam ripozas.
 La reĝo: (*okupigis pri la horloĝo, ne aŭdis*) Kio?
 Fredi: Nenio.
 La reĝo: (*rigardas sian horloĝon*) Tiu nebulo...
 Fredi: (*rigardas sian horloĝon*) Meznokto. Iom poste.
 La reĝo: Dankon. Pardonu. Mi devas iri.
 Fredi: Paĉjo – mi povas veturigi vin.
 La reĝo: (*embarasita*) Ne... Ne... Dankon. Mi volas vagadi ankoraŭ iomete... Piede... Ĝis la stacio... Mi amas vagadi tra tiuj stratoj. Sole... Por memori... Mi memoras. Mi memoras multegon. Tro multon... Nur tio restas kun mi, mia memoro... kvazaŭ ia bufono...
 Fredi: Ĉu vi trinkus kafon?
 La reĝo: Kafon? - Ne, ne. Mi devas foriri... Estas malfrue...
 Fredi: Ĉu vi scias, jam jarojn mi atendas okazon por trinki kun vi kafon en Asfodel.
 La reĝo: Asfodel?
 Fredi: La kafejo apud la stacidomo... Ĉu vi ne sidas tie, ĉiam, ĉiun mardon kaj sabaton nokte, antaŭ ol vi iras – por rigardi?
 La reĝo: De kie vi scias ĉion ĉi?
 Fredi: Simple. Mi iris post vi.
 La reĝo: Kion signifas, 'iris post mi'?
 Fredi: Viaj rakontoj... Ekde mia junaĝo mi estis altirita al viaj trajnoj. Tio estas en la familio, kiel oni diras.
 La reĝo: Do, ĉu vi sekvadis min?!
 Fredi: Nur komence. Poste mi mem trovis la vojon.
 La reĝo: La vojon kien?
 Fredi: Al viaj trajnoj.
 La reĝo: Al la trajnoj?!... Al la trajnoj... Kial vi ne demandis?... Vi povus rakonti al mi... Vi povus peti... Akompani... Trinki kafon... La

stacidomo ne estas tiom for... Kaj la vidaĵo tie estas belega, jes... ekbriloj de distanco... polvo de obskuraj, longaj vojoj... trajno enveturas... trajno elveturas... Vi povus diri al mi... (*hupo*)

Fredi:

Enveturas.

La reĝo:

(*elprenas sian horloĝon*) Jes. Mi jam trinkis kafon... Antaŭ kelkaj minutoj... Pardonu min... Estas malfrue... Mi devas foriri... tre malfrue... Vi povus rakonti al mi... Ĉion... Bonan nokton. (*Li sinturnas en la direkton de la eliro*)

Fredi:

(*Tre milde*) Paĉjo.

(*La Reĝo haltas, sed ne sinturnas*)

Fredi:

Dekstren, *papuŝ*.

(*La reĝo sinturnas kaj rigardas lin*)

Fredi:

Dekstren, kaj ĉe la unua strateto maldekstren, tri domojn de la angulo. Hotel Excelsior.

La reĝo:

(*Sufokita krio*) Kion vi volas de mi?

Fredi:

Kostas tridek pesetojn, kaj dek por la ĉambro. Ĉu vi pagas pli? Ŝi havas problemojn lastatempe. Ŝia malgranda paŝtisto falis en la manojn de la uloj de la polico. Ĉu ŝi ne rakontis al vi? Tial, *papuŝ*, floroj ne estas ekzakte tio, kion ŝi bezonas. Floroj ne estas tio, kion ŝi bezonas, entute. Ŝi havas oran koron.

La reĝo:

(*rapidegas al li, haltas antaŭ li, sojle de ploro*) Pri kio vi parolas? Pri kio vi parolas?

Fredi:

Oni nomas ŝin ĉi tie Sankta Marita, ĉar kun ĉiu trajno kiu enveturas aŭ elveturas, ŝi faras la signon de la kruco.

La reĝo:

Vi – ne –

Fredi:

Ne, mi ne estas sankta. Mi pagas. Ĉiam.

La reĝo:

Vi ne estis kun ŝi? Ne –

Fredi:

Mi revenas de ŝi.

La reĝo:

(*subite, krias*) Mi amas ŝin.

Fredi:

Bonan nokton, *papà*. (*Li ne foriras*)

Ridinde. Por unu momento mi sentis mian koron. Klik'. Mia patro plus Marita plus – mia patrino. Kaj mi estas ene. Klik'. Sed mi estas laca. Kaj mi havas naŭzon. Eble nur pro tiu ĉi nebulo. *Buenas noches*, padre. (*ekiras, sed tuj haltas*). Tamen, estas strange. Klik' en la koro. Verŝajne tiel oni ekvidas vaporon elirantan el la profundo de la tero. Kaj reĝecon kaj ekzilon, kaj amon. Kaj poste - hop', Dion kun ĉiuj anĝeloj. Jam nun mi povas kun Marita nur du fojojn. (*patose*) "Ho, ve, la junaĝo de Sankta Ferdinando pasas. Kaj estis iam tago, kiam estis li kun sia patro en la bordelo... "

(foriras)

La reĝo: (Krias post li) Ferdinand! (Sed Fredi jam eliris. Li ekkrias en teruro) Ferdinand!... (kaj poste flustre, rigardante la florojn) Ferdinand... Mia filo, mia filo...
(Li turnas sin rapide dekstren, al la ŝildo **Hotel Excelsior**. Tamburoj kaj flutoj akompanas lin, sed li haltas mezvoje, kaj revenas al la strato-lanterno. Li denove ŝanĝas sian opinion, rektigas sian staturon kaj iras malrapide en la direkton de la ŝildo **Hotel Excelsior**. La tamburoj kaj flutoj akompanas lin, kaj la scenejo iom post iom mallumiĝas.)

Noto:

La rakonto de la tuta teatraĵo, kies elektita unusola sceno estas nun esperantigita, estas sufiĉe komplika: Unu tagon la reĝo ricevas poŝte de novjorko magnetofonon kaj grandan monsumon. La letero de la mistere subskribinta 'usona princino' petas la reĝon surbendigi sian vivhistorion. Poste fama reĝisoro kreas filmon pri la vivo de la reĝo, kaj la ĉefa aktoro kiu ludas la reĝon, estas ne alia ol lia propra filo, kronprince Ferdinand. La filo devas en la filmo edziĝi kun la reĝino (sia patrino) kaj naski sin mem. En la dua parto de la filmo-en-teatraĵo, Ferdinand jam ludas sin mem, kaj la reĝon, kiu (en la filmo) estas murdita de sia filo en 'revolucio', ludas profesia aktoro, sozio kiu aspektas fizike tute idente al la reĝo. Tamen la 'usona princino' postulas, ke la lastan scenon, la murdo de la patro far la filo, ludu ne aktoro, sed la vera reĝo. La komenco de la teatraĵo montras fakte la finon de la rakonto: Ferdinand, arestita de la polico, estas akuzata pri la murdo de sia patro. Ial la morto de la reĝo, kiu devus okazi nur en la filmo, okazis en la realo.

Unua prezento en Esperanto, dum landa kunveno de ELI, junio 2010. La reĝo: Gian Piero Savio; Fredi: Doron Modan.

Israela Kongreso en Kacrin

Amri Wandel

(Artikolo aperinta en *Esperanto*, julio 2010)

Partopreninte Israelan Esperanto-Semajnfinojn en oktobro 2009 Renato Corseti skribis (Esperanto, januaro 2010) "Israelanoj tre modeste nomas sian aŭtunan aranĝon KIES, Komuna Israela Esperanto-Semajnfino. Fakte temas pri speco de landa kongreso, kiun partoprenas esperantistaj aktivuloj el ĉiuj partoj de la lando". Sekve ELI decidis ŝanĝi la nomon, kaj senrilate al la nomo, ankaŭ la sezonon. La ĉi-jara tutlanda semajnfino okazis en majo, unuafoje sub la nomo "Israela Kongreso", sed efektive temis pri la 11-a tutlanda semajnfina renkontiĝo

(KIES). Gastigis ĝin la norda urbeto Kacrin, kie partoprenis 30 personoj, inkluzive de eksterlandaj e-istoj (el Germanio). La ĉi-jara nombro de partoprenanoj estis signife malpli granda kompare al la pasintjara KIES en Pac-Oazo, tre verŝajne pro la pli granda distanco el la centro de la lando. Kiel pasintjare oni disdonis program-libreton. La kleriga programo inkluzivis prelegon kun lumbildoj pri Kubo kaj prelegojn pri la ĉeftemo:



humuro – de J. Ŝemer pri juda humuro kaj de A. Kerbel pri rusa humuro. Okazis tuttagaj kaj duontagaj ekskursoj al diversaj interesaj lokoj en Kacrin (kiel la antikva sinagogo) kaj al la bela natura ĉirkaŭaĵo, kiel la bazalta akvoriĉa kanjono "Zavitan", la natura rezervejo kaj antikva juda fortikaĵo "Gamla" kaj la nova pendanta ponto super la jordana fonto "Banjas" kaj la krucbatalanta fortikaĵo Kal'at Nimrod. La vespera distra parto inkluzivis sociajn lingvajn ludojn por komencantoj kaj progresantoj, aktivigon per kartoj, ventro-dancadon kaj kvizon. Partoprenis pluraj gejunuloj de JELI. La Kongreson organizis Nava Cinori kaj Amri Wandel. Fotoj videblas ĉe <http://picasaweb.google.com/Amri.nivut/KIES11IK2010#>

Por eksterlandaj partoprenantoj okazis du ekskursoj (vidu la sekvan artikolon) - antaŭ la kongreso ekskurso al Jerusalemo, la Morta Maro, Negev kaj Jordanio (Petra kaj ŭedo Rum), kaj post la kongreso en la Galileo - Nazareto, Hajfo kaj Akko. Por la venontjara Israela Kongreso (okazonta la 7-9 de aprilo 2011 en Cezareo) ELI esperas havi pli da eksterlandanoj.



Ŝhauri Ŝemer klarigas dum la ekskurso al Kal'at Nimrod. Fotis J. Tilleman

Rava sperto en Israelo **Peter Kühnel (Germanio)**

Post nokta flugo de Berlino al Tel-Avivo ni frumatene trajne atingis stacion en la urbocentro, kie Josi kaptis nin kaj proponis al ni kelkhoran ripozon en sia hejmo. Tagmeze ni komune veturis tra la malnova urbo al la plaĝo kaj al Jafo. Tie ni promenis tra la antikva kvartalo, rigardis malnovajn domojn, la etan havenon kaj la moskeon, kaj bone manĝis en subĉiela restoracio.

Vespere ni veturis al Makabim, kie nin akceptis Amri. Kun li komenciĝis unusemajna aventuro tra belega kaj interesege lando. Unue ni veturis al Jerusalemo. Tie nin plej interesis la malnova centro kun la antikvaj heredaĵoj kaj aliflanke la vive buntaj budoj kaj vendejoj. Ĉar ni antaŭe ne estis en Israelo, ni ĉion nur konis de fotoj kaj el libroj. Sed la realo ĉiam estas multe pli interesa.

Sekvan tagon ni veturis al Kumran, kie antaŭ nur malmultaj jaroj estis retrovitaj antikvaj skribaj dokumentoj de tre fruaj judoj. Ni bone povis vidi la fundamentojn de la fruaj domoj kaj basenoj. Malgranda muzeo ilustris la iaman tempon kaj la trovon de la rulitaj skribaĵoj. Post pikniko ĉe la morta maro ni naĝis en ĝi. Stranga sperto, en tiel pro la salo peza akvo. Kaj la varmo en la ombro: 38 gradoj - jam en majo. Nu, ni estis en la plej profunda loko de nia globo, 400 m sub mara nivelo.

Alia iom jam sporta evento estis en la natura parko de En Gedi: dum pluraj horoj ni marŝis kaj grimpis tra kanjono, kie ni ankaŭ devis trapasi akvobasenojn, kie ni malsekiĝis ĝis la koksoj. Kelfoje ni devis grimpi helpe de ŝnuroj kaj metalaj eskaloj.



Peter kaj Margrit en la oazo En Gedi ĉe Morta Maro. Fotis AW


La penojn dolĉiĝis bela naturo: abundaj plantoj kaj kelkfoje cervoj en distanco de nur kvin metroj! Por atingi supren al Masada ni uzis la telferon ŝparante tempon kaj energion. La panoramo de tiu monto estas mirinda, same kiel la historio de la loĝantoj antaŭ du mil jaroj. Por atingi la fortkastelon sur la monto, la agresantaj romianoj devis konstrui altan artan deklivon el tero, kio daŭris ok monatojn. Por

ne fali en la manojn de la romianoj, la preskaŭ mil homoj en la kastelo memmortigis sin.

En Eilat antaŭ la matena manĝo ni iris en la maron kaj naĝis al la koralaj rifoj, kiuj brilas en multaj koloroj, ni snorklis kaj vidis amason da diversaj fiŝoj en ĉiuj koloroj. Dum la tago ni ekskursis tra la ĉirkaŭaĵo kaj migris tra la bela ruĝa kanjono. Vespere ni satigis nin per bongustaj fiŝoj.

Postan matenon alvenis Jinon el la nordo al nia triopo kaj ni ekis kune al Jordanio. La landlima kontrolo daŭris preskaŭ du horojn kaj iom memorigis nin pri tiuj severaj kontroloj inter ambaŭ Germanioj antaŭ pli ol du jardekoj.

En Jordanio ni unue vizitis Ŭedo Rum: grandioza natura parko kiel dezerto kun rokaj montoj. Post subĉiela vespermanĝo Amri kaj Jinon dormis sub la nigra ĉielo, Margrit kaj mi en beduena tendo. Aliaj homoj situis plurajn kilometrojn for. Sekvan tagon ni pluveturis al Petra, antikva urbo en alta kanjono. La postajn tagojn ni partoprenis la Israelan Kongreson en Kacrin kun bunta programo, pri kio eblas legi en la antaŭa artikolo.



Post tiu kongreso Jinon gvidis Margrit kaj min ĉirkaŭ la lagon de Tiberiado, tra la urboj Tiberiado kaj Nazareto al Hajfo.

Antaŭkongresa vizito al Petra. Fotis J.Meiri

En Hajfo Johoŝua montris al ni Bahaajn ĝardenojn kaj la germanan-templeran kvartalon. Alian tagon li akompanis nin al Akko, tre malnova urbo ĉe la Mediteraneo. Post ripoza tago ĉe la strando de Hajfo ni reveturis al Tel-Avivo, kie ni ĝuis plian tagon rigardante la urbon.

Ni ege ĝuis tiujn du semajnojn en amika etoso. Ni povis bone akriki kaj fajnigi nian bildon pri Israelo, danke al la realo kaj al niaj esperantistaj amikoj.

Kore salutas el Berlino: Margrit Schober kaj Peter Kühnel

Shirley eklernis Esperanton en la interreto (per "Lernu") kaj tuj ekaktivis en JELI. Kiam ELI anoncis la stipendion por somere studi Esperanton en Usono, ŝi tuj ekinteresiĝis, sed estis unu problemeto: la entrepreno kie ŝi laboris ne permesis la necesan libertempon. Ŝi ne bezonis multan tempon por decidi: inter la posteno kaj monato en Esperantujo ŝi elektis la duan kaj demisiis (sed ne zorgu, ŝi jam havas novan postenon). Eran Vodevoz intervjuis Shirley pri ŝiaj spertoj.

E: Saluton Shirley, estas bone vidi vin.

Ĉu vi povas rakonti kion vi faris dum la lasta somero?

S: Mi trinkis multe da rumo.

E: Kaj krom tio, ĉu vi memoras ?

S: Mi estis en Esperantujo. Mi komencis ĉe NASK en Kalifornio, poste veturis al UK (Universala Kongreso) kaj IJK (Internacia Junulara Kongreso) en Kubo.

E: En UK kaj IJK mi ankaŭ estis, sed kio damne estas NASK?

S: NASK estas Nord Amerika Somera Kursaro. Tie estas kurso por progresantoj kaj kurso de Esperanto por mezniveluloj. Ĝi okazas en la universitato de San Diego, kaj venas tien homoj ĉefe el Usono, kaj kelkaj "fremduloj". Ĉi-okaze mi volas danki al ELI, NASK kaj Aberta Casey. Dank al ilia malavaraj stipendioj mi havis la ŝancon partopreni en NASK.

E: Via partopreno en NASK fakte estis via unua Esperanta travivaĵo eksterlande. Kiel ĝi estis? Ĉu vi ne iomete timetis?

S: La plej multaj homoj tie estis en pli alta nivelo de Esperanto ol mi, do la komenco estis iom malfacila. Komence

mi volis paroli la anglan, sed poste mi komprenis pli kaj pli en Esperanto. La instruistoj estis tre bonaj (Lee Miller kaj Katalin Kovats), kaj en la fino de la tri-semajna kursaro mi povis kompreni multe kaj eĉ iomete babili en Esperanto.

E: Ĉu homoj ne krokodilas tie foje?

S: Ili apenaŭ krokodilas. Mi devis paroli Esperanton aŭ silenti....



Shirley en la NASK-atesto-ceremonio en la U. de San Diego

E: Do vi ŝajne ne estas tiom siletema....

S: Tie mi iom estis.

E: Ĉu vi volas rakonti pri interesaj vortoj aŭ travivaĵoj de via ekskurso?

S: Mi lernis kelekajn tre interesajn vortojn kiel "araneoj", "blatoj", "kuloj" kaj tiel plu, sed ĝi estis en Kubo.

E: Kubo ja ŝajne estas interesa lando, ĉu ne?

S: Jes, kaj mi ankaŭ havis pozitivajn travivaĵojn tie. Mi salutis la UK-on nome de Israelo. Ĝi ja estis granda honoro.

E: Mi ne ĉeestis tie sed aŭdis ke vi bone salutis.

S: Jes, mi ja sukcesis diri unu longan frazon antaŭ ĉiuj kongresantoj, sed poste mi parolis multe kun homoj el la tuta mondo, kaj sukcesis bone komunikiĝi.

E: Do ni jam komencis paroli ankaŭ pri la kongresoj... kio estis via plej bona aŭ profunda travivaĵo de la Kongresoj?

S: Estis unu afero kiu estis tre emocia. En la fino de la IJK, kelkaj kubanoj kun kiuj mi konatiĝis ploris kiam ni forlasis. Kontraŭe al aliaj esperantistoj ili sciis ke ili ne povas veturi en la mondo, do povas esti ke ili ne renkontos nin denove. Por multaj homoj

el Kubo, kiu estas tre malriĉa lando, la okazo de la kongreso tie estis tre unika oportuno renkontiĝi kun esperantistoj el eksterlando, kaj do la adiaŭo estis iom trista kaj emocia. Kiam homoj scias ke ili ne plu renkontiĝos ili pli alte taksas kaj ĝuas la renkontiĝon.

E: Do mi komprenas ke vi havas multajn novajn amikojn el Kubo kaj el aliaj landoj.

S: Jes. Mi pensas ke la kontaktoj kun homoj de aliaj landoj kaj de aliaj kulturoj eble estas la plej bona parto de mia veturo. Ĝi estas la

pinto de mia veturo, kaj fakte la unuan fojon en mia vivo mi vere povis uzi Esperanton por kontakti homojn, kiuj ne volas kaj ne povas komuniki en la angla.

E: Kiel vi resumos vian veturon?

S: Nun mi estas fiera Esperantistino kaj mi ekkonis multajn novajn homojn kaj insektojn ☺



Shirley salutas la UK-n en Havano nome de Israelo. Fotis AW

Tri kongresojn mi vizitis ĉi-somere en Kubo: unu de UEA kaj du de TEJO.

La Universalan kaj Junularan Esperanto-kongresojn en Kubo partoprenis po kvar Israelanoj (entute ses personoj). Neniu israelano havis vizajn problemojn, sed tri israelaj partoprenantoj en la UK, kiuj uzis la oficialan kongresan flugkompanion "Cubana", ne ricevis la rabatitan prezon reklamitan de UEA.

En la Universala Kongreso en Havano okazis pluraj kontribuoj de israelaj partoprenantoj: Josi Ŝemer (kiu ankaŭ reprezentis Israelon en la Komitato de UEA kaj en la ILEI-kongreso), impone prelegis pri sia sperto kiel klubestro dum la Tago de la Lernejo, organizita de ILEI. Shirley Amrani ĉarme salutis la inaŭguron nome de Israelo, kaj invitis la kongresanojn al Israelo por partopreni la 7an Azian Kongreson en 2013.

Mi prelegis kadre de la Esperantologia Konferenco pri la temo "Esperanto en la ombro de la angla", varbante por la posta diskuto talentajn debatantojn kiel Probal Dasgupta, Jose-Antonio Vergara kaj Juuka Pietlainen.

Inter la gajnintoj en la Belartaj Konkursoj estis tri israelanoj: Luiza Carol (3a loko en la kategorio Poezio), Doron Modan (2a loko en la kategorio eseo) kaj Gian Piero

Savio (honora mencio por filmo - la intervjuo kun M.Gišpling).

Partoprenis ankaŭ du "duon-israelanoj" – Niel Blonstein, kiu dum pluraj jaroj loĝis en Israelo kaj nun



Josi prelegas en Tago de la Lernejo, la UK en Havano. Fotis AW

estas la UEA-representanto en la UN-oficejo en Novjorko, kaj Ŝaj Mor, membro de ELI kiu loĝas en Kanado sed devenas el Israelo. Ĉiuj partoprenantoj tre ĝuis la renkontiĝon kun la speciala lando, popolo kaj kulturo de la amikemaj kubanoj – ekzemple dum la Nacia Vespero kaj la ekskursoj. Dum la ekskursita tago mi vizitis

la malnovan urbon de Havano, ĉar tiu estis la sola tago kiam ne okazis kunsidoj kaj prelegoj kiujn mi devis partopreni. Estis bele renkonti la ridetemajn kubanojn, vidi la famajn aŭtojn de la kvindekaj jaroj, kaj vespere ĝui la mitologian nokto-klubon "Tropicana".

Post la streĉa laboro en la Universala Kongreso (Komitat- kaj Estrar-kunsidoj, Internacia Kongresa Universitato, aliaj prelegoj) mi decidis ripozi kaj nostalgiumi en la IJK – post kvaronjarcenta foresto (mia lasta IJK estis en Israelo 1986, tamen kiel organizanto). Verŝajne pluraj aliaj veteranoj havis similan penson, ĉar jam

en Havano, atendente la buson al la IJK mi renkontis multajn geamikojn kiuj estis TEJO-membroj antaŭ jardekoj. La busvojaĝo kaj la enĉambriĝo okazis laŭ "kuba tempo": la lastaj



Israelaj gejunuloj ĉe la naĝejo dum la IJK en Kubo. Fotis AW

kongresanoj atingis la ejon kun malfruo de kvin horoj. La interkonan vesperon anstataŭis vicatendado por la enĉambriĝo kiu daŭris ĝis post la noktomezo. Tamen la organizantoj kaj volontuloj (inter ili la Israela kasisto de TEJO Sergeo Tyrin kaj lia amikino Raya) estis tre helpemaj kaj fine la problemoj estis solvitaj. En la mateno ĉio aspetis brile: ni troviĝis en eta paradizo – belega plaĝo kun koralrifo, agrablaj kaj komfortaj kabanoj inter verdaĵo kaj palmoj, riĉaj manĝoj, senpagaj trinkaĵoj kaj kokteloj tuttage kaj eĉ nokte... verda braceleto surmetita dum la registriĝo provizis liberan uzon de ĉiuj frandaĵoj: manĝaĵoj, trinkaĵoj, sportludoj en la naĝejo kaj surplaĝe... La Internacia Junulara Kongreso kutime promesas freŝan, sendevontiĝan leĝeran etoson, kie dancado povas daŭri ĝis la mateno, kaj flekseblan programon, kiu ebligas alterne ĝui jen naĝbasenon, jen

trinkejon kaj foje prelegon. Despli tio estis valida en la 166a IJK en Kubo, ĉi foje samkiel dudek jarojn pli frue en la antaŭa kuba IJK. Ĉ. 180 personoj (kompare kun 153 en 1990) el 35 landoj ĝuis senzorgan semajnon en la bela kaj komforta ĉe-plaĝa ripozejo Villa Trópico, 60 km oriente de Havano.

Kontraŭe al la densa UK-programo kun pluraj paralelaj programeroj, la programo en la IJK konsistis el multe da libera tempo, 2-3 horaj manĝpaŭzoj kaj nur unusola elektableco - se oni ignoras la daŭran alternativon de la plaĝo kaj naĝejo. Ĉiuj programeroj – tagaj kaj vesperaj - okazis en unu salono-amfiteatro (kiu praktike situis tuj apud la naĝejo kaj trinkejo). Ĉar ne estis enprogramita inaŭguro, mi utilis la unuan prelegon (pri Esperanto ĉe Interreto, E@I) por saluti la kongreson nome de UEA. Post la tagmanĝo oni povis partopreni salso-danckurson ĉe la naĝejo. Inter la salso kaj la vespermanĝo la organizantoj improvize aldonis mian prelegon pri "TEJO – kiam, kial kaj kiel" – rete videbla ĉe <http://slideshare.net/amriw/historio-de-tejo-2010>. Malgraŭ la malfacila konkurenco de la naĝejo kaj trinkejo, aperis sufiĉe multaj aŭskultantoj kiuj konatiĝis kun la historio de TEJO, informiĝis pri la nuntempa junulara slango kaj aŭdis nekonatajn historietojn, ekzemple pri la TEJO-flago kiun mi varbis por TEJO dum la IJK en Meksiko en 1981, la "ombra manifesto de Raŭma" kaj la honoraj prezidantoj de TEJO.



La TEJO-flago en la IJK en Kubo, 2010. Dekstre videblas la IJKj de 1981 (Oaxtepec), 1986 (Neŭrim) kaj 1990 (Plaja Giron). Fotis AW

Aparte aktuala estis la rakonto pri la adopto de "La Bambo" kiel *oficialan* himnon de TEJO, ĉar tio okazis... en Kubo, dum la IJK en 1990. La Nacia Vespero estis ĉarma kaj bonŝance – malsame al tiu de la UK – ne enhavis anglalingvan parton. Iom simile al la Movada Foiro dum UK, en la IJK okazis Kulturlingva Festivalo kun ĉirkaŭ 20 standoj de diversaj landoj, dum kiu okazis programeroj de diversaj kulturoj, ekzemple teatraĵo pri Brazila geedziĝo aŭ instruado de meksika danco.

Eble vi jam scivolas, kio do estis la tria kongreso. Post la IJK, ekskursante tra Kubo, mia itinero pasis tra la urbeto Playa Girón. Ĝi havas gravan rolon en la historio de Kubo– tie okazis la malsukcesa usona invado ĉe la Golfo de Porkoj en 1961, dokumentita en interesa muzeo pri tiu batalo. Kompreneble, en la historio de TEJO, Playa Girón ludis diferencon rolon – tie okazis la IJK en 1990. Ne partopreninte la tiaman IJKn mi ne sciis kiel trovi la ejon, sed evidentiĝis ke la urbeto havas nur unu grandan (kvankam iom kadukan) hotelo-feriejon. Mi ne esperis trovi spurojn de la IJK, sed kia koincido – la unua hotela stabano kiun mi demandis eklaboris kiel knabo antaŭ iom pli ol dudek jaroj kaj klare memoris la



La aŭtoro apud la kongresejo de la IJK de 1990.

IJKn kaj eĉ la fakton ke multaj el ĝiaj partoprenantoj severe malsaniĝis pro malpura akvo. Estis iasence fermo de cirklo: tria amerika IJK (post Meksiko en 1981 kaj Kubo en 1990), kiun kompletigis la historioj pri la TEJO-flago kaj la Bambo. Ĉu post generacio TEJO revenos al tiu mirinda lando, de suno, palmoj, amikemaj homoj, mojitoj kaj salso, kie la tempo ŝajne haltis ie en la sesdekaj?

Antaŭ du jaroj mi ricevis de Hans Bakker, nia amiko el Nederlando, tri esperantlingvajn broŝurojn, kiujn li heredis antaŭ multaj jaroj de siaj esperantistaj gepatroj Hans kaj Mies. Ĉiuj tri estis eldonitaj de la Cionista Organizaĵo (*Hahistadrut Hacijonit*) dum la 20-aj kaj 30-aj jaroj de la 20-a jarcento kun la celo disdonadi dum kelkaj Universalaj Kongresoj de Esperanto. Temis pri la tempoj dum kiuj la cionista movado faris multajn klopodojn konvinki la mondon pri la neceso rekrei judan ŝtaton en Palestino aŭ almenaŭ informi la publikon kaj la ŝtatistojn, ĉefe en Eŭropo, pri la juda nacia movado kaj pri la entrepreno de granda juda konstruado okazanta en la historia patrujo. Tiam iu proponis al la koncernaj funkciuloj de la Cionista Organizaĵo traduki propagandan materialon al Esperanto kaj disdoni ĝin al la kongresanoj. Tre tre verŝajne temis pri Immanuel Olsvanger (1888-1961), kiu estis samtempe fama esperantisto kaj cionista aktivulo: li laboris por la cionista fonduso Keren Hajesod kaj estis sendita de ili al multaj judaj komunumoj tra la mondo. Do, dank` al li aperis tri broŝuroj, eldonitaj de la cionistaj fondusoj Keren-Kajemmet kaj Keren-Hajesod dum la jaroj 1925-1939. Jen iom da detaloj pri tiu ĉi tre unika kaj interesa entrepreno:

1. En 1925 aperis la 15-paĝa broŝuro *Hebrea Progreso en Palestino*. Sur la ĉefpaĝo mi legas: "Prezentiita al la 17-a Tutmonda Kongreso de Esperanto en Ĝenevo en Aŭgusto 1925 de la Centra Cionista Organizaĵo." La teksto estis iom adaptita al esperantistaj legantoj, ĉar en ĝi aperas la jena frazo: "Inter la famaj hebreoj, kiuj laboris en la unuaj jaroj de tiu ĉi movado, devas esti nomata ankaŭ D-ro L. L. Zamenhof, kiu fondis la unuan Hovevej-Cion-societon en Varsovio."

En alia loko, kie oni rakontas pri la Hebrea Nacia Biblioteko, aperas la jena teksto: "D-ro Immanuel Olsvanger, kiu reprezentas la Cionistan Organizaĵon ĉe la 17-a Esperanto-Kongreso, intencas krei specialan Esperantan Sekcion en tiu ĉi biblioteko kiel monumenton al la neforgesebla nomo de D-ro L. L. Zamenhof, kiu flanke de sia plej granda vivkreado estis fervora amiko de la ideo de la Hebrea Renaskiĝo."

Jen kelkaj interesaj citaĵoj el tiu ĉi broŝuro:

- "La Universitato en Jerusalemo estas la unua moderne-eŭropa alta lernejo en la oriento.... Per ĝi ankaŭ ni tiros la limon de Eŭropo ĝis la Eŭfrato."

- "Por uzi esprimon de la prezidanto de la Cionista Organizado, D-ro Chaim Weizmann, ĝne la filoj de getto-komercistoj alvenas al Palestino, sed la nepoj de hebreaj profetoj."


- "Kun nekomparebla fervoro ili, la junuloj, inter kiuj multaj estis armitaj je alta universitata edukado, komencis trahaki la rokojn, sekigi la marĉojn, kaj planti arbojn kaj legomojn en tiaj lokoj, kie dum jarmiloj eĉ herbeto ne kreskis."

2. En la 24-a Universala Kongreso de Esperanto en Parizo, 1932, oni disdonis alian broŝuron nomitan *La Reestiĝo de Nacio*. Ĝi konsistis el 23 paĝoj kaj prezentis la "sukceson de la hebreoj en Palestino."

Jen kelkaj frazoj aperantaj en la unua paragrafo: "Dum miljaroj la Araboj ne povis kaj ne volis progresigi la landon, kaj la antaŭmilita Turka registaro ne helpis al ili trovi novan vojon de laboro. Ĝis la nuntempa reveno de la Hebreoj la lando restis ekonomie senvalora. Kvankam Hebreoj ĉiam loĝis en Palestino, tiuj de la malnova periodo okupiĝis nur pri preĝoj kaj pia studo, kaj ne helpis la evoluon de la lando, kvazaŭ amante ĝian malriĉecon kaj malprogresemon." (Interesa analizo, ĉu ne?...)

Pri tiu ĉi broŝuro jam skribis en *Israela Esperantisto* n-ro 151 (vintro 2009) Jean Amouroux el Francio, prezentante demandon pri eventuala dumkongresa kunveno ligita al la broŝura projekto.

3. En julio 1939, ĵus antaŭ la eksplodo de la dua mondmilito, okazis en la neŭtrala Svislando la 31-a UK, en la ĉefurbo Bern. Tiujare la cionisma movado bezonis eĉ pli ol antaŭe la helpon de la mondo, ĉar la britaj regantoj de Palestino fermis ekde 1937 preskaŭ hermetike la limojn de Palestino por judaj enmigrintoj kaj ankaŭ publikigis limigojn striktajn por judoj pri aĉeto de teroj de araboj. Do, la *Tutmonda Cionista Organizado* (en la unua broŝuro ĝi nomiĝis *Centra Cionista Organizaĵo*; en la dua la nomo estis



simple *Cionista Organizo...*) eldonis la grandformatan 16-paĝan broŝuron *Oni Konstruas Landon* speciale por la Berna UK. Tiu ĉi broŝuro estis eldonita en Jerusalemo kaj presita en Tel-Avivo, dum la du unuaj eldoniĝis kaj presiĝis en Londono.

Ni kontentiĝu pri ununura interesa citaĵo el tiu ĉi publikaĵo: "Komerco kaj liberaj profesioj estis la ĉefaj okupoj de la Hebreoj en Eŭropo, kaj eĉ en Ameriko. Terlaboro inter ili estis tre malmulte konata. Tial oni eĉ kreis la legendon, ke la Hebreoj ne kapablas sin okupi per terlaboro. Sed jen, la kolonizado de Palestino pruvas la kontraŭon. Estintaj komercistoj, advokatoj, instruistoj k.t.p. montriĝis kiel tre efikaj, sukcesplenaj terlaboristoj."

En ĉiuj tri broŝuroj aperis multe da fotoj, kiuj montris la laboron de la judaj pioniraj terkulturistoj sur la kampoj, de la masonistoj kaj eĉ de fiŝkaptistoj. Aperis fotoj de kibucoj, moŝavoj, urboj (precipe Tel-Avivo), fabrikoj, elektrostacioj ktp. En la tria broŝuro estis multege da grandformataj fotoj, inter kiuj elstaris laborantaj virinoj.

Verdire tiu, kiu legas hodiaŭ la tekstojn, sentas troan patoson. Sed ni ja scias ke en la tiamaj jaroj la varbiloj kaj propagandiloj de tiuj, kiuj klopodis altiri la simpatiecojn de la nejudoj al la faroj de la juda nacia movado (la cionismo), ofte uzis tian stilon. Ne mirinde estas, ke ankaŭ al la esperantistaj gojoj oni turnis sin sammaniere.

Verdire mi jam delonge sciis pri la apero de almenaŭ unu aŭ du broŝuroj, ĉar oni mencias tion en la enciklopedia libro **Esperanto en Perspektivo**, kiun UEA eldonis en 1974. Sur paĝo 467 ni legas: "En 1925 la Centra Cionista Organizaĵo ekaplikis Esperanton, submetante al la Universalaj Kongresoj en 1925 kaj 1926 broŝurojn pri la progreso en Palestino (verkitajn de Immanuel Olsvanger)." Se vi kontrolos supre vi trovos, ke mi posedas broŝurojn el 1925, 1932 kaj 1939 sed ne el 1926. Ĉu tio signifas, ke aperis kvara broŝuro? Aŭ eble en 1926 oni disdonis denove la broŝuron el 1925? Aŭ eble la verkinto de la libro **EeP** simple eraris aldonante la jaron 1926? Ĉu iu el vi, karaj legantoj, havas respondon?

Mi finu citante la lastan frazon de la tria broŝuro: "Se unu jaron la Esperantistoj decidis kongresi en Palestino, ili ricevos tre varman, koran bonvenon." Kaj ni, la israelaj esperantistoj, efektivigis tiun ĉi deziron en la jaro 2000...

Kanto al Paco: memore al J. Rabin

Amri Wandel

Aantaŭ dek kvin jaroj, en la placo kiu hodiaŭ portas lian nomon, staris la ĉefministro Rabin sur la podio, fine de amasa subten-demonstracio, kaj kune kun la kantistino Miri Aloni, lia kolego Ŝimon Peres kaj aliaj, kantis el tajpita paĝo la kanton kiu multe identiĝis kun la pac-procezo: Kanto al Paco. Kelkajn minutojn poste li estis mort-pafita, la paĝo kun la teksto de la kanto, kiu ankoraŭ troviĝis en la poŝo de lia jakto, estis makulita per lia sango. Tri jarojn pli frue mi tradukis "Kanton al Paco" por la dua sonkasedo "Israelo ne ĉesas kanti" de hebreaj kaj jidaj kantoj en Esperanto, kantitaj de Tova Ben-Cvi. Ĝi sekvis la unuan sonkasedon de israelaj kantoj en Esperanto, "Israelo Kantas", kiun mi produktis dek jarojn pli frue (kun la kantistino Chantal) kiu elĉerpiĝis delonge. La fama kanto "Kanto al Paco" verkita de Jaakov Rotblit estis siatempe malpermesita por dissendo en la radio. En la naŭdekaj jaroj ĝi fariĝis unu el la simboloj de la maldekstra por-paca movado. Post la murdo de Rabin, ĝi fariĝis ankaŭ unu el la kantoj kantitaj je lia memoro, ĉiujare en la datreveno de la murdo. Nature, la kantistino Miri Aloni fariĝis plej identigita kun tiu kanto. Kelkajn jarojn poste ŝi prezentis kant-vesperon en mia loĝloko, kaj post la koncerto mi alparolis ŝin kaj proponis ke ŝi kantu la Kanton al Paco en Esperanto en unu el niaj Landaj Kunvenoj. Ŝi entuziasmiĝis kaj diris ke tio estos "la kanto de paco en la lingvo de paco", sed la afero ne realiĝis ĉar ŝia impresario enmiksiĝis kaj postulis tre altan pagon por ŝia prezento. La rakonto daŭras en la jaro 2000, kiam okaze de la Universala Kongreso en Tel Avivo ELI planis eldoni kompaktdiskon kun israelaj kantoj. La projekto efektiviĝis unu jaron poste. La KD-on, kiu konsistis el 28 kantoj – la plejmulto de ambaŭ sonkasedoj, mi nomis "Venu Paco" kaj la du kantoj ĉe ĝia komenco estas "Bonvenu Paco sur vin" kaj "Kanto al Paco".

La lasta ĉapitro en tiu rakonto okazis en 2009, kiam dum la Internacia Libro-Foiro de Jerusalemo prezidento Peres vizitis la budojn. Kiam li preteriris la Esperanto-budon, mi demandis lin ĉu li memoras ke li estis la alta protektanto de la UK en la jaro 2000. Li memoris, kaj tiam mi donacis al li la KD-n kaj rakontis la historion pri la esperanto-traduko de la Kanto al Paco. Mi – kaj eble iomete ankaŭ li – emocie sentis ke fermiĝis cirklo. La Esperanta traduko aperis en la jar-kajero 2010 de la literatura bulteno "Ŝvilim" aperanta en la urbo Modiin (en mia konstanta rubriko tie, de kantoj tradukitaj en Esperanton).

Kanto al paco

Teksto: J. Rotblit
Melodio: J. Rozenblum
Tradukis: Amri Wandel

Venu luma sun-radi',
matena ilumin'
La plej pura preĝ' al Di'
ne revivigos nin

Kies vivon tuŝis fin'
Kaj kuŝas en la ter'
Ne plorego vekos lin
Por viva efemer'

Person' ne revenigos nin
El tomba la infer'
Utilos ja nek ĝojo de triumf' kaj venk'
Nek kantoj de liber'

שיר לשלום

מילים: יענקל'ה רוטבליט
לחן: יאיר רוזנבלום

תנו לשמש לעלות
לבוקר להאיר,
הזכה שבתפילות
אותנו לא תחזיר.

מי אשר כבה נרו
ובעפר נטמן,
בכי מר לא יעירו
לא יחזירו לכאן.

איש אותנו לא ישיב
מבור תחתית אפל,
כאן לא יועילו
לא שמחת הניצחון
ולא שירי הלל.

Refreno:

Do laŭte kantu, kanton al pac'
Ne flustru preĝon pri
Plenvoĉe laŭdu l'pacon sen lac'
Ne ĉesu via kri'.

Tra la floroj de l'tombej'
Penetru suna bril'
Eĉ falintoj karaj plej,
Ripozu en trankvil'

Kun espero la spirit'
Ne cedu al minac'
Kantu ne por la milit'
Sed por la am' kaj pac'

Ne diru "iam venos pac' ",
Alportu ĝin vi mem
Ne estas rev' kaj sonu do en ĉiu plac'
Jubil' kaj pac-poem'

Refreno

פזמון

לכן, רק שירו שיר לשלום
אל תלחשו תפילה
מוטב תשירו שיר לשלום
בצעקה גדולה.

תנו לשמש לחזור
מבעד לפרחים.
אל תביטו לאחור,
הניחו להולכים.

שאו עיניים בתקווה,
לא דרך כוונות
שירו שיר לאהבה
ולא למלחמות.

אל תגידו יום יבוא -
הביאו את היום!
כי לא חלום הוא
ובכל הכיכרות
הריעו לשלום

פזמון

KIEL ĈIAM lastmomente, mi mendis flugbileton. "Kial Mongolio?" demandis min la vendisto, "kiu flugas tien?" – Nu, mi!!!! Tra Moskvo mi flugis al la 6-a Azia Kongreso en Ulan Batoro. Post longa vojaĝo mi finfine alvenis kaj tute ne bedaŭris. Kompreneble mi tuj renkontis malnovajn kaj novajn geamikojn. Estis tre interesa kongreso, kun riĉa programo sub la temo "Azia Harmoniigo per Esperanto", kiu ne estis nur titolo. Kiel en ĉiuj renkontiĝoj okazis ekskursoj, muzikaj programoj kaj dancoj, kaj prelegoj pri la historio kaj kulturo de Mongolio, tra kiuj mi malkovris tre belan kaj unikan landon. Sed mi ne venis nur por turismi kaj renkonti geamikojn; mi havis taskon. Antaŭ ol ekvojaĝi mi ricevis la jenan leteron:

"Kara Esti,

Bonan vojaĝon kaj sukceson en la Azia Kongreso! Vi ne rajtas reveni sen pozitiva decido pri la

7a Azia Kongreso. Kaj fotu multe – ni jam atendas vian prelegon pri Mongolio...

Amike, Amri"

Mi tre ĝojis ke mi atingis tiun celon - la pozitiva decido, ke la 7-a Azia Kongreso okazos en 2013 en Israelo, kaj revenis kun multaj unikaj travivaĵoj kaj belaj fotoj.



Esti en la 6-a Azia Kongreso en Ulan Batoro.

Mi volas danki al la prezidanto de Mongola E-Asocio s-ro Chimedtseren Enkhee kaj al la organizantoj por tre agrabla tempo. Ĝis revido en Israelo en 2013!

Esperanto kiel pera lingvo por instrui la hebrean

Luiza Carol

Esperanto havas grandajn avantaĝojn kiel pera lingvo. La gramatiko de Esperanto estas tiom racia kaj simpla, ke ĝi povas esti pli utila ol la gramatiko de la denaska lingvo, kiam oni instruas la bazan gramatikon de ajna etna lingvo. Rilate la bazan vortaron, la genia sistemo de tabelvortoj povas esti ege utila por instrui la koncernajn ŝlosilvortojn en ajna etna lingvo. La neŭtraleco de Esperanto igas ĝin pli taŭga ol la angla, kiam oni uzas la manlibrojn por instrui al internaciaj grupoj.

Krom la ĝeneralaj avantaĝoj, kiuj validas kiam oni instruas ajnan etnan lingvon pere de Esperanto, oni povas trovi ankaŭ specifajn avantaĝojn rilate la instruadon de ĉiu specifa etna lingvo. Jen du avantaĝoj kiuj validas specife por la lernantoj de la hebrea:

1. Ĉiuj sonoj de la hebrea povas esti skribitaj per Esperantaj literoj. Tial, la hebrea prononco povas esti perfekte spegulita per Esperantaj literoj. Male, la angla alfabeto pruvigas maltaŭga por tio (ĉar en la angla oni ne skribas ĉiun sonon ĉiam per la sama litero). La tradicia hebrea sistemo de "nikud" (kiu montras la prononcon) estas tiom malsimpla, ke nur gravaj fakuloj vere scipovas ĝin ĝisfunde. Laŭ mia propra sperto, la Esperanta-hebrea vortaro de Josef Murĵan estas plej taŭga kaj simpla ilo por lerni la prononcojn de hebreaj vortoj. Bedaŭrinde, la hebrea-Esperanta vortaro de la sama aŭtoro ankoraŭ ne enhavas la prononcojn de hebreaj vortoj per Esperantaj literoj. Verŝajne, la venonta plibonigita eldono forigos tiun mankon, kaj tiam ankaŭ tiu ĉi vortaro fariĝos ege utila por la lernantoj de la hebrea, kiuj uzas Esperanton kiel peran lingvon.

2. La instruado de la hebreaj kaŭzativaj kaj reflexivaj verboj estus ege faciligita, se oni uzus Esperanton kiel peran lingvon. Jen kiel oni povas prezenti la 7 "binjanim" pere de Esperanto:

plej ofte: simplaj verboj – פעל
plej ofte: "-ig-" verboj (igantaj agojn) – הפעיל
plej ofte: "-ig-" verboj (igantaj ŝanĝojn) – פיעל

plej ofte: "-iĝ-" verboj – התפעל
ofte: "-iĝ-" verboj (pri aliformiĝo); participaj de simplaj verboj – נפעל
participaj de "-ig-" verboj (igantaj agojn) – הופעל
participaj de "-ig-" verboj (igantaj ŝanĝojn) – פועל

Mi proponas, ke oni uzu kiel eble plej ofte la lingvon Esperanto kiel ilon, por instrui la hebrean plej efike.

Persona Angulo: Heide Martha Otto

Renkontiĝo kun la Templanoj en Hajfa



Mi nomiĝas Heide Martha Otto. Mi estas membro de BEL (Bahaa Esperanto-Ligo), vivas - ekde 1996 - en Albanio, sed dum la lastaj 6 jaroj volontulas en la Bahaa Monda Centro en Hajfa, Israelo - unue en la Internacia Biblioteko kaj de 4 jaroj kiel gvidanto de bahaaj pilgrimantoj alvenantaj el la tuta mondo. Ĉiun duan semajnon alvenas inter 200-400 pilgrimantoj, kiuj dividiĝas en diversajn lingvogrupojn (angla, persa, hispana, franca, germana, rusa, itala, turka.)

Se vi jam estis en Hajfa vi certe konas la avenuon Ben-Gurion, nomatan ankaŭ "Germana Kolonio". Ĝi estis restaŭrita antaŭ kelkaj jaroj far la urbestro kaj nun estas ŝatata loko por sidi sub la ombro de la arboj kaj trinki/drinki aŭ manĝi ion kaj babili kun amikoj en unu el la multnombraj arabaj aŭ judaj restoracioj en agrabla etoso kun vidaĵo al la Sanktejo de Bab.

En la jaro 1868, kiam Bahá'u'lláh kun sepdeko da familianoj kaj adeptoj estis enkarcerigitaj en la aĉa prizono de Akko, alvenis je la alia flanko de la golfo grupo da germanaj t.n. Templanoj firme decidintaj setli en tiu dezerta lando, tiam apartenanta al la Otomana Imperio. Estis ege malfacile krei tian modelan

kolonion en islama lando. Ili atendis la revenon de Jesuo Kristo samkiel la usonaj adventistoj, kies gvidanto William Miller kalkulis el la profetaĵoj de la Malnova Testamento ke Jesuo Kristo reaperos en la printempo de 1884. La Templanoj volis rekrei la Templon en Jerusalemo kaj vivi kiel bonaj Kristanoj laŭ la originaj kristanaj instruoj .Ili venis el suda Germanio, kie ili organizis pietistan komunumon .Inter ili estis bonaj laboristoj, metiistoj, inĝenieroj kaj farmistoj, kiuj multe kontribuis al la evoluo de tiu parto de la lando .La du estroj Christoph Hoffmann kaj Georg David Hardegg baldaŭ disiĝis por fondi diversajn koloniojn apud Jafo, en Jerusalemo kaj en aliaj lokoj .La Templanoj havis oftajn kontaktojn kun ‘Abdu’l-Bahá el la apuda‘ Persa Kolonio .’Li ofte vizitis la germanojn, donacis dolĉaĵojn al la infanoj kaj aĉetis terenon de unu el ili .Bahá’u’lláh ankaŭ vizitis la kolonion. Li starigis Sian tendon en diversaj lokoj kaj pasigis kelkajn tagojn en la ‘Domo de Olifant’ (cetere la lasta ĝis nun ne restaŭrita domo en la tuta strato) .

S-ro Hardegg vizitis ‘Abdu’l-Bahá en Akko kaj Baha’u’lláh skribis al li leteron, la Law-i-Hartik. Sur la linteloj de multaj domoj ambaŭflanke de la avenuo Ben-Gurion legeblas ankoraŭ citaĵoj el la Biblio kiel: “La Sinjoro estas proksima”, “Via regno venu” aŭ “El la profundo de mia koro mi alvokas vin, Sinjoro.” Post la 2^a mondmilito ĉiuj germanaj Templanoj estis forpelitaj el Palestino; kelkaj revenis al Germanio dum la plimulto setlis en Aŭstralio, kie ilia ĉefa centro nun troviĝas en Melburno. Kio do estis mia privata kontakto kun ili?

En aprilo skribis al mi Gisbert Schaal, bahaa amiko el la regiono de Stuttgart, Germanio, demandante ĉu mi povus akompani grupon da Templanoj dezirantaj viziti la terasojn de la Sanktejo de Bab en Hajfa .Bonŝance mi povis liberigi min tiam de la laboro .Do ni renkontiĝis matene je la 19^a teraso sur la Monto Karmelo .La grupo konsistis el 28 personoj, el kiuj 10 venis el Aŭstralio kaj la ceteraj el la regiono de Stuttgart .La gvidanto de la grupo estis juna israelano, S-ro Jakob Eisler .Li bonege regas la germanan kaj fakte estas la arkivisto de la grupo en Stuttgart .La plejmultaj vizitantoj estis sufiĉe aĝaj kaj iliaj antaŭloj estis la iamaj fondintoj aŭ loĝintoj de la kolonio. Ekzemple, s-ino Brigitte Hoffmann, pranepino de Christoph Hoffmann .Ŝi daŭre aktivis en la germana komunumo . Aliaj eĉ naskiĝis en Hajfa, posedis iun domon aŭ havas parencojn kiuj tiam vivis en la kolonio.



La Templanoj sur la terasoj de la Bahaa Centro en Hajfo, fone la Germana Kolonio kaj la haveno.
Fotis: Martha Otto.

Estis ege interese por mi lerni tiom da historiaj detaloj .Ili multege fotis dum nia malsupreniro de la terasoj kaj ĝuis la belan medion en printempa vetero .Je la mezo troviĝas la “Buroo por publika informado”(Office of Public Information) kie ili volis vidi filmon pri la Bahaa Kredo kaj poste vizitis belan ekspozicion pri la bahaa historio kaj aktivecoj en la tuta mondo.

Ni ankaŭ vizitis la Sanktejon de Bab, kiu ege bedaŭrinde estas tute kovrita pro kompleta restaŭro .Ili tamen povis vidi la enirejon kaj promeni en la ĝardenoj . Ĉiuj volis daŭrigi la malsupreniron ĝis la 1^a teraso je la avenuo Ben-Gurion. Ĉiujare grupo da Templanoj vojaĝas al la Sankta Lando por viziti siajn historiajn lokojn en diversaj urboj kaj por tie prizorgi la tombejojn de siaj antaŭuloj .Ili ege ĝuis tiun unuan viziton de la bahaaj terasoj kaj ĝardenoj kaj simpatia maljunulo diris al mi: “Dieser Besuch hat sich gelohnt ”! (Tiu ĉi vizito estis vere inda). Dum mi reen iris al la oficejo mi iom pripensis la liston de germanaj citaĵoj sur multaj domoj pri kiuj ni parolis .Precipe unu el ili restis kiel demando en mia menso kaj okupis min la tutan tagon“ :Sinjoro, kiu restos sur via Sankta Monto.....”

La Pereo Kiu Venis al Sarnato

H. P. Lovecraft

Tradukis Adam Mesha (Raizen)

Verkita la 3-an de Decembro 1919

Eldonita Junion 1920 en The Scot, No. 44, pp. 90-8.


Originalo troveblas ĉe

<http://www.dagonbytes.com/thelibrary/lovecraft/thedoomthatcametosarnath.htm>

ESTAS EN LA LANDO MNARO vasta kvieta lago, al kiu fluas neniu rivereto, kaj el kiu neniu rivereto fluas. Antaŭ dek mil jaroj staris apud ĝia bordo la fortega urbo Sarnato, sed staras tie Sarnato ne plu.

Oni rakontas, ke en nememoreblaj jaroj kiam la mondo estis juna, antaŭ ol iam la loĝantoj de Sarnato venis al la lando Mnaro, alia urbo staris apud la lago; la grizŝtona urbo Ibo, kiu estis malnova kiel la lago mem, kaj loĝata de estuloj ne plaĉaj vidadspekte. Tre strangaj kaj malbelaj estis tiuj estuloj, kiel ja estas la plejparto de la estuloj de mondo ankoraŭ elkreskanta kaj malfajne konstruita. Estas skribite sur la brikaj cilindroj de Kadaterono, ke la estuloj de Ibo estis kolore tiel verdaj kiel la lago kaj la nebuletoj, kiuj leviĝas super ĝi; ke ili havis ŝvelajn okulojn, paŭtajn, grasajn lipojn, kaj kuriozajn orelojn, kaj estis sen voĉo. Estas ankaŭ skribite, ke ili malsupreniris unu nokton de la luno en nebuleto; ili kaj la vasta kvieta lago kaj grizŝtona urbo Ibo. Ĉu vere aŭ ne, estas certe, ke ili adoris mar-verdan ŝtonan idolon ĉizitan laŭ la formo de Bokrugo, la granda akvo-lacerto; antaŭ kiu ili dancadis horore kiam la luno ŝvelis. Kaj estas skribite en la papiruso de Ilarneko, ke ili unu tagon eltrovis fajron, kaj poste ekbrulis flamojn je multaj ceremoniaj okazoj. Sed ne multe estas skribite pri tiuj estuloj, ĉar ili vivis en tre antikva tempo, kaj la homo estas juna, kaj scias nur malmulte pri la tre antikvaj vivuloj.

Post multaj epokoj homoj venis al la lando Mnaro, malhela paŝtista gento kun siaj lanriĉaj ŝafaroj, kiuj konstruis Traon, Ilarnekon, kaj Kadateronon sur la serpentanta rivero Ajo. Kaj certaj triboj, pli fortikaj ol la ceteraj, antaŭeniris pluen ĝis la bordo de la lago kaj konstruis Sarnaton ĉe loko kie altvaloraj metaloj troviĝis en la tero.



Ne malproksime de la griza urbo Ibo metis la vagantaj triboj la unuajn ŝtonojn de Sarnato, kaj je la estuloj de Ibo ili tre miris. Sed kun ilia mirado miksiĝis malamo, ĉar ili taksis netaŭge, ke estuloj tiaaspektaj trairus la mondon de homoj je krepusko. Nek plaĉis al ili la strangajn skulptaĵojn sur la grizaj ŝtonegoj de Ibo, ĉar kial tiuj skulptaĵoj postrestis tiel malfrue en la mondo, eĉ ĝis la veno de homoj, neniu sciis; krom se ĉar la lando Mnaro estas tre kvieta, kaj malproksima de aliaj landoj, kaj maldormaj kaj sonĝaj.

Dum la homoj de Sarnato pli alrigardis la estulojn de Ibo ilia malamo kreskis, kaj ĝi ne estis malpli pro tio, ke ili trovis la estulojn malfortaj, kaj molaj kiel gelateno je la tuŝo de ŝtonoj kaj sagoj. Do unu tagon la junaj batalistoj, la katapultistoj kaj la lancistoj kaj la pafarkistoj, almarŝis kontraŭ Ibo kaj mortigis ĉiujn ties loĝantojn, puŝante la strangajn korpojn en la lagon per longaj lancoj, ĉar ili ne deziris ilin tuŝi. Kaj ĉar ne plaĉis al ili la grizaj skulptitaj monumentoj de Ibo ili ĵetis ankaŭ ĉi tiujn en la lagon; mirante, pro la grandeco de la laboro, kiel entute la ŝtonoj alportiĝis de malproksime, kiel ili certe alportiĝis, ĉar estas neniu kiel ili en la lando Mnaro aŭ en la landoj apudaj.

Tiel de la tre antikva urbo Ibo nenio saviĝis, krom la mar-verda ŝtona idolo ĉizita laŭ la formo de Bokrugo, la akvo-lacerto. Tiun la junaj batalistoj reprenis kun si kiel simbolon de konkero super la malnovaj

dioj kaj estuloj de Ibo, kaj kiel signon de gvidanteco en Mnaro. Sed la nokton post kiam oni starigis ĝin en la templo, terura afero certe okazis, ĉar strangaj lumoj estis vidataj super la lago, kaj je la mateno oni trovis, ke la idolo estas malaperinta kaj la ĉefpastro Taran-Iŝo kuŝas malviva, kiel pro ia timo nedirebla. Kaj antaŭ ol li mortis, Taran-Iŝo skribaĉis sur la krizolita altaro per krudaj, ŝanceliĝemaj strekoj la signon de PEREO.

Post Taran-Iŝo estis multaj ĉefpastroj en Sarnato sed neniam troviĝis la mar-verda ŝtona idolo. Kaj multaj centjaroj venis kaj iris, en kiuj Sarnato prosperegis, tiel ke nur pastroj kaj maljunulinoj memoris, kion skribaĉis Taran-Iŝo sur la altaro el krizolito. Inter Sarnato kaj la urbo Ilarneko estiĝis karavana kurso, kaj la altvaloraj metaloj el la tero interŝanĝiĝis kontraŭ aliaj metaloj kaj raraj tuloj kaj juveloj kaj libroj kaj iloj por artefarantoj kaj ĉiuj luksaĵoj kiuj estas konataj de la homoj kiuj loĝas laŭ la serpentanta rivero Ajo kaj pretere. Do Sarnato fariĝis forta kaj klera kaj bela, kaj elsendis konkerantajn armeojn por subpremi la najbarajn urbojn; kaj fine sidis sur trono en Sarnato la reĝoj de la tuta lando Mnaro kaj de multaj landoj apudaj.

La miro de la mondo kaj la fiero de la tuta homaro estis Sarnato la grandioza. El polurita dezert-minita marmoro estis ĝiaj muroj, altaj je tricent ulnoj kaj larĝaj je sepdek kvin, tiel ke ĉaroj povu pasi unu la alian dum homoj kondukis ilin laŭ la supro. Kvincent plenajn stadiojn ili kursis, malfermite nur je la flanko al la lago, kie verdŝtona mar-muro detenis la ondojn, kiuj strange leviĝis po unu fojon en jaro dum la festeno de la detruo de Ibo. En Sarnato estis kvindek stratoj de la lago ĝis la pordegoj de la karavanoj, kaj kvindek pliaj, kiuj interkruciĝis kun ili. Per onikso ili estis pavimitaj, krom tiuj sur kiuj tretis la ĉevaloj kaj kameloj kaj elefantoj, kiuj estis pavimitaj per granito. Kaj la pordegoj de Sarnato estis tiel multaj kiel la alteraj finoj de la stratoj, ĉiuj el bronzo, kaj flankitaj de la figuroj de leonoj kaj elefantoj ĉizitaj el ia ŝtono ne plu konata inter homoj. La domoj de Sarnato estis el glazura briko kaj kalcedonio, kaj ĉiuj havis sian muran ĝardenon kaj kristalan lageton. Per stranga arto ili estis konstruitaj, ĉar neniu alia urbo havis tiajn domojn; kaj vojaĝantoj el Trao kaj Ilarneko kaj Kadaterono miris je la brilaj kupoloj kiuj super ili estis muntitaj.

Sed eĉ pli mirigaj estis la palacoj kaj la temploj, kaj la ĝardenoj faritaj de Zokaro la praa reĝo. Estis multaj palacoj, la lastaj el kiuj estis pli grandaj ol iu ajn en Trao aŭ Ilarneko aŭ Kadaterono. Tiel altaj ili estis, ke oni interne povus iafoje imagi sin sub nur la ĉielo; sed prilumite per torĉoj trempitaj en la oleo de Doterio, iliaj muroj montris vastajn pentraĵojn de reĝoj kaj armeoj, de grandiozo samtempe inspira kaj sensentiga por la rigardanto. Multaj estis la kolonoj de la palacoj, ĉiuj el nuancita marmoro, kaj ĉizitaj al desegnaĵoj de supera belo. Kaj en la plejparto de la palacoj la plankoj estis mozaikoj de berilo kaj lazurŝtono kaj sardionikso kaj karbunkolo kaj aliaj raraj materialoj, tiel dismetitaj, ke la rigardanto povus imagi sin suriranta bedojn de la plej raraj floroj. Kaj same estis fontanoj, kiuj ĵetis bonodorajn akvojn per plaĉaj ŝprucaĵoj aranĝitaj kun ruza arto. Superbrilante ĉiujn aliajn estis la palaco de reĝoj de Mnaro kaj de la landoj apudaj. Sur paro da oraj kaŭrantaj leonoj kuŝis la trono, multajn ŝtupojn super la brilanta planko. Kaj ĝi estis prilaborita el unu peco da eburo, kvankam neniu homo vivas, kiu scias, de kie povus veni tiel granda peco. En tiu palaco estis ankaŭ multaj galerioj, kaj multaj amfiteatroj, kie leonoj kaj homoj kaj elefantoj interbataladis je la plaĉo de la regoj. Iafaje la amfiteatroj estis inunditaj per akvo kondukita el la lago per grandegaj akveduktoj, kaj tiam oni starigis ekscitajn batalojn inter naĝantoj kaj mortigipovaj maruloj.

Altaj kaj mirigaj estis la dek sep tursimilaj temploj de Sarnato, prilaboritaj el brila multkolora ŝtono ne konata aliloke. Mil tutajn ulnojn alta staris la plej granda inter ili, en kiu la ĉefpastroj loĝis kun grandiozo apenaŭ malpli ol tiu de la reĝoj. Sur la tero estis ĉambregoj same vastaj kaj belegaj kiel tiuj de la palacoj; kie kolektiĝis amasoj por adori Zo-Kalaron kaj Tamaŝon kaj Lobonon, la ĉefajn diojn de Sarnato, kies incens-ĉirkaŭitaj sanktejoj estis kiel la tronoj de monarĥoj. Ne kiel la ikonoj de aliaj dioj estis tiuj de Zo-Kaloro kaj Tamaŝo kaj Lobono. Ĉar tiel vivecaj ili estis, ke oni povus ĵuri, ke la graciaj barabaj dioj mem sidis sur la eburaj tronoj. Kaj supren al la senfinaj ŝtupoj el zirkono estis la turĉambro, de kie la ĉefpastroj elrigardis super la urbo kaj la ebenaĵoj kaj lago tage, kaj je la mistera luno kaj la signifaj steloj kaj la planedoj, kaj iliaj speguladoj en la lago, nokte. Jen oni faris la tre sekretan kaj

antikvan riton de abomenado de Bokrugo, la akvo-lacerto, kaj ĉi tie kuŝis la altaro el krizolito, kiu portis la Pereo-skribaĉo de Taran-Iŝo.

Mirigaj same estis la ĝardenoj faritaj de Zokaro la praa reĝo. En la centro de Sarnato ili kuŝis, kovrante grandan spacon kaj ĉirkaŭite de alta muro. Kaj super ili estis muntita grandega kupolo el vitro, tra kiu brilis la suno kaj la luno kaj planedoj kiam estis klare, kaj de kiu pendis brilegaj bildoj de la suno kaj la luno kaj la steloj kaj la planedoj kiam estis neklare. Somere la ĝardenoj estis malvarmigataj per freŝaj odoraj ventetoj lerte blovigataj de ventumiloj, kaj vintre ili estis varmigataj per kaŝaj fajroj, tiel ke en tiuj ĝardenoj estis ĉiam printempo. Fluis riveretoj sur brilaj ŝtonetoj, dividante kampojn de verdo kaj ĝardenojn multnuancajn, kaj transetendate de multo de pontoj. Multaj estis la akvofaloj en siaj kursoj, kaj multaj estis la nuancitaj laĝetoj en kiujn ili plivastiĝis. Super la riveretoj kaj laĝetoj rajdis blankaj cignoj, dum la muziko de raraj birdoj sonoris kun la melodio de la akvoj. En ordigitaj teracoj leviĝis la verdaj bordoj, ornamitaj tie kaj tie per laŭboj de grimpantaj kreskaĵoj kaj dolĉaj burĝonoj, kaj sidejoj kaj benkoj el marmoro kaj porfiro. Kaj tie estis multaj sanktejoj kaj temploj, kie oni povus ripozi aŭ preĝi al malgrandaj dioj.

Ĉiun jaron oni celebris en Sarnato la festenon de la detruo de Ibo, kiam vino, kanto, danco, kaj ĝojado de ĉia speco abundis. Grandajn honorojn oni donis al la spiritoj de tiuj, kiuj neniigis la strangajn antikvajn estulojn, kaj la memoro de tiuj estuloj kaj de iliaj pradioj estis mokata de dancistoj kaj liutistoj kronitaj per rozoj el la ĝardenoj de Zokaro. Kaj la reĝoj elrigardadis super la lago kaj malbenis la ostojn de la mortintoj, kiuj kuŝis sub ĝi.

En la komenco la ĉefpastroj ne ŝatis tiujn festenojn, ĉar diskoniĝis inter ili strangaj fabeloj pri tio, kiel la mar-verda ikono malaperis, kaj kiel Taran-Iŝo mortis pro timo kaj postlasis averton. Kaj ili diris, ke de sia alta turo ili iafoje vidis lumojn sub la akvoj de la lago. Sed kiam multaj jaroj pasis sen katastrofo, eĉ la pastroj ridis kaj malbenis kaj partoprenis la orgiojn de la festenantoj. Ja, ĉu ili mem, en sia alta turo, ne efektivigis la tre antikvan kaj sekretan riton de abomenado de Bokrugo, la akvo-lacerto? Kaj mil jaroj de riĉo kaj ĝojo pasis super Sarnato, miro de la mondo.

Rava preter penso estis la festeno de la mila jaro de la detruo de Ibo. Dum dekjaro oni parolis pri ĝi en la lando Mnaro, kaj dum ĝi alproksimiĝis venis al Sarnato sur ĉevaloj kaj kameloj kaj elefantoj homoj el Trao, Ilarneko, kaj Kadeterono, kaj ĉiuj urboj de Mnaro kaj la landoj preteraj. Antaŭ la marmoraj muroj je la destinita nokto estis muntitaj la pavilonoj de princoj kaj la tendoj de vojaĝantoj. Ene de tiu festen-aŭlo kliniĝis Nargis-Hejo, la reĝo, ebria per antikva vino el la keloj de konkerita Pnoto, kaj ĉirkaŭita de festantaj nobeloj kaj rapidantaj sklavoĵoj. Manĝiĝis multaj strangaj frandaĵoj je tiu festeno; pavoĵoj el la foraj montetoj de Linplano, kalkanoj de kameloj el la Bnaza dezerto, nuksoj kaj spicoj el Sindatriaĵoj boskoj, kaj perloj el ond-lavata Mtalo solvitaj en la vinagro de Trao. Da saŭcoj estis nedirebla nombro, preparitaj de la plej subtilaj kuiristoj en la tuto de Mnaro, kaj taŭgaj por la palato de ĉiu festenanto. Sed la plej ŝatataj el la viandoj estis la grandaj fiŝoj el la lago, ĉiu de vasta grando, kaj prezentitaj sur oraj pladoj enmuntitaj per rubenoj kaj diamantoj.

Dum la reĝo kaj liaj nobeloj festenadis en la palaco, kaj rigardis la kronan pladon dum ĝi atendis ilin sur oraj pladoj, aliaj festmanĝis aliloke. En la turo de la granda templo la pastroj okazigis festojn, kaj en pavilonoj ekster la muroj la princoj el najbaraj landoj ĝoje festenis. Kaj estis la ĉefpastro Gnaj-Kaho, kiu la unua vidis la ombrojn, kiuj malleviĝis de la ŝvela luno en la lagon, kaj la damnindaj verdaj nebuletoj, kiuj leviĝis de la lago por renkonti la lunon kaj por vuali per malicaŭgura nebuleto la turojn kaj la kupolojn de fatala Sarnato. Poste, tiuj en la turoj kaj ekster la muroj vidis strangajn lumojn sur la akvo, kaj vidis, ke la griza roko Akuriono, kiu ordinare leviĝis alte super ĝi apud la lagbordo, estis preskaŭ subakvigita. Kaj timo kreskis malprecize sed rapide, tiel ke la princoj de Ilarneko kaj de fora Rokolo malmuntis kaj faldis siajn tendojn kaj pavilonojn kaj foriris, kvankam ili apenaŭ sciis la kaŭzon de sia foriro.

Tiam, proksime al la noktomeza horo, ĉiuj el al bronzaĵoj pordegoj de Sarnato krevis kaj malpleniĝante elpelis frenezan amason, kiu nigriĝis la ebenaĵon, tiel ke ĉiuj el la vizitantoj princoj kaj vojaĝantoj fuĝis pro timo. Ĉar je la vizaĝo de tiu amaso estis skribita frenezo naskita de hororo neeltenebla, kaj je iliaj langoj estis vortoj tiel teruraj, ke neniu aŭdanto hezitis por trovi pruvon. Homoj, kies okuloj

estis sovaĝaj pro timo kriis laŭte pro la vido ene de la festen-aŭlo de la reĝo, kie tra la fenestroj ne plu estis vidataj la formoj de Nargis-Hejo kaj liaj nobeloj kaj sklavoĵoj, sed trupo de nepriskribeblaj verdaj senvoĉaj aferoj kun ŝvelantaj okuloj, paŭtaj, grasaj lipoj, kaj kuriozaj oreloj; aferoj kiuj dancis horore, portante en la manoj orajn pladojn enmuntitajn per rubenoj kaj diamantoj kaj enhavantajn krudajn flamojn. Kaj la princoj kaj vojaĝantoj, dum ili fuĝis de la fatala urbo Sarnato sur ĉevaloj kaj kameloj kaj elefantoj, denove rigardis la nebulet-faran lagon kaj vidis la grizan rokon Akuriono tute subakvigita. Tra la tuta lando Mnaro kaj la lando apuda disvastiĝis la fabeloj de tiuj, kiuj fuĝis el Sarnato, kaj karavanoj ne plu serĉis tiun malbenitan urbon kaj ĝiajn altvalorajn metalojn. Pasis longe ĝis iu ajn vojaĝanto iris tien, kaj eĉ tiam nur la kuraĝaj kaj aventuramaj junuloj kun flavaj haroj kaj bluaj okuloj, kiuj ne estas parencoj al la loĝantoj de Mnaro. Tiuj homoj ja iris al la lago por rigardi Sarnaton; sed kvankam ili trovis la vastan kvietan lagon mem, kaj la grizan rokon Akuriono kiu leviĝas alte super ĝi apud la bordo, ili ne rigardis la miron de la mondo kaj la fieron de la tuta homaro. Kie iam leviĝis muroj de tri cent ulnoj kaj turoj ankoraŭ pli altaj, nun etendiĝis nur la marĉa strando, kaj kie iam loĝis kvin milionoj da homoj nun rampis la abomeninda akvo-lacerto. Ne unu el la minoj de altvalora metalo restis. PEREO estis veninta al Sarnato.

Sed duone enterigita en la junkoj oni ekrigardis kuriozan verdan idolon; ekstreme antikvan idolon ĉizitan laŭ la formo de Bokruĝo, la granda akvo-lacerto. Tiu idolo, sanktigita en la ĉeftemplo ĉe Ilarneko, estis poste adorata sub la ŝvela luno tra la tuta lando Mnaro.

Agado de ELI dum 2010

Estraro de ELI: Prezidanto - Amri Wandel, Vicprezidanto - Jehoŝua Tilleman, Sekretario-kasisto - Josef Ŝemer. Membroj: Joni Kis-Lev, Lea Kudevitzki, Matilda Landaŭ, Eldad Salzman, Eran Vodevoz, Esti Saban, Gavriel Zeevi, Nava Cinori. Okazis 10 kunsidoj de la Estraro.

Kunvenoj: La 11-a Israela Kongreso (KIES) okazis en Kacrin en majo. Partoprenis 30 personoj, el ili 2 eksterlandanoj. ELI decidis okazigi la venontan kongreson en Cezareo: 7–9 de aprilo 2011.

Tutlandaj kunvenoj okazis en Tel-Avivo en julio kaj en decembro. Average partoprenis ĉ. 50 personoj.

Loka agado: En Tel-Avivo oni kunvenas ĉiusemajne krom en aŭgusto. Partoprenis inter 8 kaj 28 personoj. En la tradicia somerfina renkontiĝo, kiu unuafoje okazis en la kafejo "Kafe-Kafe", partoprenis rekorda nombro de 37

personoj. Post tiu renkontiĝo ĉ. dek personoj plue renkontiĝis en la nova "Kafejo Esperanto" en la strato Zamenhof kaj parolis kun la estroj pri estonta kunlaboro, ekzemple esperanta traduko de la menuo kaj afiŝoj kun klarigoj pri



Esperantistoj en "Kafejo Esperanto" post la somerfina renkontiĝo Zamenhof kaj Esperanto.

En Ĥajfa okazis ĉi-jare kelkaj kunvenoj en la hejmo de Martha Otto. Ankaŭ Jerusalemaj esperantistoj kunvenis kelkfoje.

Kursoj: en T-A komenciĝis en novembro en la domo Bikurej Haitim nova kurso. Krome okazis tie paroliga kurso por 5-9 personoj preskaŭ ĉiun mardon laŭlonge de la tuta jaro.

Israela Esperantisto: Aperas duobla numero en decembro.

Azia Agado: En junio Esti Saban reprezentis ELI en la kongreso de KAEM (Azia movado) okazinta en Mongolio. Oni decidis tie okazigi en 2013 la Azian Kongreson en Israelo. (vidu p. 24).

JELI: Dum la jaro okazis kelkaj kunvenoj de niaj gejunuloj. Partoprenis 8–12 gejunuloj.

Subvencio por partopreno en la UK/IJK. Post multjara paŭzo ELI subvenciis la partoprenon de juna novulino – Shirley Amrani en la Esperanto-kongresoj, sekve de ŝia partopreno en NASK (vidu p. 13).

Novaj esperantistoj: Ni bonvenigas la novulojn Jevgeni Bogomolni, Janiv Gabaj-Muller, Shirley Amrani, Shoshana Majer, Dror Gaon, Pavel Brouhis, Nemets Jemelian, Lidja Gelmajev kaj Ofer Lahav.

Gratuloj

- ELI gratulas siajn membrojn kiuj gajnis en la belartaj konkursoj en Havano - Luiza Carol (Prozo – 3a premio el 30 aŭtoroj), Doron Modan (Eseo – 2a premio el 8 aŭtoroj) kaj Gian Piero Savio (Filmo – honora mencio).

- Gratulojn al nia juna estrarano Joni Kis-lev, okaze de la sukcesa prezentado de liaj pentraĵoj en Naharia.

Ni funebras: Ŝmuel Mizeruĥa (1929-2010)

La 14-an de Aprilo (je la mortotago de d-ro Zamenhof) mortis la israela esperantisto **Ŝmuel Mizeruĥa**, 81-jaraĝa. Li vivis en Kirjat-Jam (apud Hajfa) ekde sia enmigro el Sovetio en 1973.

Ŝmuel naskiĝis en 1929 en Kievo (Ukrainio) kaj post la studoj iĝis inĝeniero pri maŝinprojekto. Lerninte Esperanton en 1958 li ekaktivis en la E-sekcio ĉe la Kieva *Domo de Sciencistoj* : dum kelkaj jaroj li redaktis maŝinskribatan kaj multobligatan literaturan E-revuon "*Amikeco*" kaj poste – la E-bultenon "*Tra soveta Ukrainio*". Kaj en Ukrainio kaj en Israelo li tradukadis poemojn el la rusa kaj ukraina lingvoj al Esperanto, sed ankaŭ verkadis originalajn. Pluraj liaj poemoj aperis en *Israela Esperantisto* , plej menciindaj: *Tri Edifoj* kaj *Balado pri Klistero* . Granda sukceso estis por li, kiam en 1984 William Auld inkluzivis lian poemon *La vorto* en la *Antologio de Esperanto* , kiun UEA eldonis kadre de la Jubilea Kolekto *Jarcento de Esperanto* . Sed dum en la *Antologio* li kundividis la honoron kun Josef Kohen-Cedek, en *Poemaro por Paco* eldonita far UEA en 1986 (omaĝe al Internacia Jaro de Paco), lia sama poemo estis la **sol**a kontribuo de Israelo. Ŝmuel ne okupiĝis nur pri poemoj: kiel inĝeniero li verkis kaj eldonigis ankaŭ libron teknologian – *Ŝtancila terminaro* . Krome li estis multjara membro de UEA, kaj inter 1978 kaj 2002 servis kiel Delegito kaj Fakdelegito pri maŝinprojekto en Kirjat-Jam. Ekde la jaro 2002 li tute ne aktivis pro

sanproblemoj, sed ĝis tiu jaro li regule partoprenadis en la kunvenoj de la *Norda Grupo*, en niaj Landaj Kunvenoj kaj eĉ en kelkaj Universalaj Kongresoj, inkluzive la Tel-Avivan en 2000. Lia memoro estu benata!

REVI: Esperante vojaĝi tra Israelo

Amri Wandel

Se vi vidas gajan grupon de gejunuloj kun granda verda stelo en profunda kanjono apud la Morta Maro, aŭ veturanta tra ŝajne ne trapaseble kruta deklivo per Ĵipo de marko "Esperanto", vi probable renkontis unu el la aventuraj ekskursoj de REVI, la Rondo de Esperanto-Vojaĝantoj en Israelo. Jam dum pli ol kvar jaroj tiuj ekskursoj okazas plurfoje jare, ofte okaze de la alveno de taŭgaj

eksterlandaj esperantistoj, plejofte al kanjonoj en la Judea dezerto. La konstantaj partoprenantoj estas kerno da aventuremaj JELI-anoj, la Esperanto-Ĵipo kaj mi. Kutime la ekskursoj estas unutagaj, plej ofte vendrede, sed plurfoje ankaŭ okazis dutagaj ekskursoj, ĉu planite ĉu improvizite (la slogano de REVI estas: oni scias kiam la ekskurso



Gaja grupo da gejunuloj kun verda stelo – foto de REVI-15

komenciĝas, sed ne kiam ĝi finiĝos). REVI-ekskursoj kutime komenciĝas frumatene en Modiin, finiĝas malfrue nokte aŭ la venontan tagon, kaj postlasas lacajn sed kontentajn partoprenintojn, ne forgesablajn travivaĵojn kaj resumajn retmesaĝojn kun fotoj (vidu mozaikon sur la dorsa kovrilo) kaj kun la tradicia saluto "Ĝis la REVI do". Kelkaj ekskursoj havis specialajn trajtojn aŭ okazaĵojn kaj estas tiel nostalgie memorataj de la REVI-veteranoj (aŭ mallonge:

REVeteranoj). Jam en la unua "oficiala" REVI-ekskurso (estis antaŭe kelkaj kiuj ankoraŭ ne portis la oficialan titolon REVI) partoprenis eksterlanda gasto – Gabrielle Corsetti. Kelkaj ekskursantoj havis malfacilaĵojn kaj malrapidigis la grupon. Sekve, ni finis la ekskurson post la sunsubiro en la mallumo. Pro la malfrua horo kelkaj restis tendumi ĉe la strando de la Morta Maro kaj revenis la venontan tagon post agrabla baniĝo. Post pluraj vizitoj al la kanjono Daraĝe, ni decidis provi ĝin en la inversa, grimpa direkto. La descenda direkto estas sufiĉe malfacila kaj bezonas glitadon el akvofaloj, krutajn descendojn kaj trapasojn de profundaj basenoj, sed la grimpa direkto estas ankoraŭ pli malfacila. La vojaĝo supren daŭris pli longe ol planite, kaj kiam, ĉe la lasta baseno, ni konstatis ke ni ne sukcesos fini antaŭ mallumiĝo, ni tranoktis en la kanjono. Raneto kaj mi iris al la proksima vilaĝeto por informi la familiojn hejme pri la malfruo kaj alporti manĝaĵojn kaj reveninte en la mallumo, por signi nian alvenon "tra densa mallumo" ni laŭte kantis la esperantan himnon. Jen priskribo el Facebook pri lastatempa REVI-ekskurso:

REVI-15: הטיול לדרגיה סיפק את הסחורה במלואה. שש שעות של שכרון חושים, גבים, מים, חבלים, סולמות וכיף. יצאנו גיפ מלא (שמונה מטיילים) בכוונה להתחיל ולגמור מוקדם. התראת השטפונות שהגיע באמצע המסלול סייעה במקצת להאיץ את הקצב, אך למולנו היא לא התממשה, השמים נותרו כחולים, והמוראל - בשמים.

Por REVeteranoj kaj interesiĝantoj - jen kompleta listo de la REVI- ekskursoj:

dato	loko / gastoj	retejo de fotoj
1 18-19.4.06	Ashalim / Gabrielle, Shira	
2 5.2006	N.Kziv, Kumran / Arien Schaud	
3 7.2007	Daraĝe inverse http://amri.pic.co.il (albumo REVI7.2007)	
4 15.10.2007	N. Cin / Mor http://picasaweb.google.com/amriwandel/NahalZinREVI4#	
5 4.2008	Daraĝe / Jan	
6 3.5.2008	N.Peres	
7 28.06.2008	Daraĝe / Irmina http://amri.pic.co.il (albumo Draot 28.6.2008)	
8 12.12.2008	Karmel http://picasaweb.google.com/Amri.nivut/REVO1208#	
9 22-23.03.09	Ceelim REVI9# (en la sama albumejo kiel la antaŭa)	
10 26-27.05.09	Ceelim REVI10#	
11 28-29.10.09	Golan / Ĵunko REVI12Golan#	
12 25-26.10.09	En Gedi /Leonardo, Junko, 7 rusoj MortaMaroPostKIES#	
13 21.01.2010	Og,Dragot / Shai REVI13#	
14 6.03.2010	Ashalim / Yael, Pnina REVI14#	
15 16.04.2010	Daraĝe / Pnina, Mor, Sara Facebook (Amri Wandel)	

REVI-Rondo de Esperanto-Vojaĝantoj de Israelo



REVI-ekskursoj en 2010 al kanjonoj Aŝalim kaj Daraĝe, ĉe la Morta Maro. Fotis AW



La 12-a Israela Kongreso (antaŭe KIES) okazos la 7-9.4.2011 en Cezareo, kun riĉa programo kaj variaj ekskursoj. 1-6.4.2011: turisma antaŭkongreso tra Israelo kaj Jordanio. Aliĝo: eli@esperanto.org.il